

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Preĝo por kuraĝo (de J. S. Hoyland). — Post kvarmonata vojaĝado (de Wilhelm Solzbacher). — Granda porpaca manifestacio en Wien (de Walter Mudrak). — Kardinalo Innitzer skribis al MOKA. — La franca katolika junularo manifestas por la paco (de J. B.). — Militarismo kaj pacifismo - kaj la katolika junularo de Germanujo (de B. M.). — La ĉefsekretario de MOKA inter la Mohawk-indianoj (de Wilhelm Solzbacher). — 1100-jara jubileo de la unua kristana preĝejo en Nitra (de Alojz Macek). — Nia Movado. — La redaktoro deziras paroli al vi (de W. S.). — Kolekto por plifortigi La Junan Batalanton. — Internacia Junulara Agado. — Alvoko al Ĝenerala Kongreso de Germanaj Katolikoj en Wien (de Walter Mudrak). — Festoj okaze de la jubileo en Nitra (de Alojz Macek).

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDOŬA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Presejo: imp. DISONAISE, J. Winandy, Dison. (Belgujo)

Abonprezoj de "La Juna Batalanto,"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	3 s	4 s	1 s 3 d	Hungarujo	3 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	3 s	4 s	1 s 3 d	Japanujo	3 s	4 s	1 s 3 d
Aŭstraljo	3 s	4 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Ĉeĥoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4z l	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50.	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	5 p	8 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevas ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Poŝtkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭsrujo : Wien D 12017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3313.51 (Imprimerie Disonaise, M. Jean Winandy).

ĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŝUROJN!

Mondjunularo Katolika, kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique, 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).

La Jeunesse Mondiale Catholique, kvarpaĝa varbilo en franca lingvo 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0.70 RM).

Dans 60 pays, dupaĝa varbilo en franca lingvo, 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM).

Towards an International Catholic Youth and Peace Movement, kvarpaĝa varbilo en angla lingvo. 10 ekz. 5 d, 8 c (0.25 RM), 50 ekz. s 1/6, dol. 0.25 (1.— RM).

Die katholische Jugend lernt Esperanto. Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

Die Katholische Weltjugendliga. Moderna informo broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

Die Katholische Weltjugendliga. 16 paĝa broŝuro aperinta 1919. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.10 RM.

Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung. Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majláth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.20 RM.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63.

PREĜO POR KURAĜO.

Sinjoro kaj Reĝo!

Ni preĝas al vi hodiaŭ, ke vi donu al ni kuraĝon por esti malestimataj pro la vero;

Kuraĝon por brave diri nian konvinkon, kvankam ĝi malutilas al ni;

Kuraĝon por rompi malbonajn kutimojn kaj malbonajn opiniojn,

Kvankam pro tio ni estas persekutataj kaj forpelataj.

Donu al ni fortan koron, kiu ne timas ion ajn, kion homoj povas fari al ni,

Konfidon je la forto de la vero,

Eĉ de tiu vero, kiu ne estas subtenata per nombroj kaj ekstera potenco,

Konfidon, ke la vero venkos per sia propra interna forto,

Ke ĝi estas super ĉia homa klopodo kaj kontraŭstaro.

Donu al ni la kuraĝon de animo, kiu malrigardas la posedon de bona nomo inter la homoj,

Kontenta, esti sola kun vi je la flanko de la justeco,

Venkanta malfortan submetiĝon al iu popola opinio;

Donu al ni, Sinjoro, vian spiriton de kuraĝo kaj braveco, ke ni liberiĝu de homtimo,

Estante fortaj kaj kuraĝaj en vi!

J. S. HOYLAND

(laŭ « A Book of Prayers »).

Post Kvarmonata voljaĝado.

Rapide kiel filmo kelkfoje preterflugas la vivo, kaj tio, kiom oni travivis antaŭ unu monato, tiam ŝajnas longe, longe pasinta. Kiam oni vojaĝis ne kiel privata persono, sed kiel internacia sekretario de Mondjunularo Katolika, oni tamen havas la devon raportari. Se mi detale komencus, mi neniam finus. Sed iom post iom mi volas skribi pri kelkaj el la plej interesaj vizitoj kaj studoj.

Usono, Kanado kaj Irlando estis la landoj, kiujn mi vizitis la unuan, espereble ne la lastan fojon. En Anglujo, Belgujo, Luksemburgo kaj Francujo mi revidis malnovajn amikojn kaj trovis novajn. Kaj mi ankoraŭ estas vojaĝanta, Dio sola scias por kiel longe.....

En la Nova Mondo oni saltigis min de unu loko al alia en terura rapideco. Ĉiujn transportilojn mi uzis. Unu dimanĉon mi veturis en la neĝa nordo kun indianoj en ĉevaltrita glitveturilo, kelkajn tagojn poste aeroplano portis min el la vintro meze en la sudan printempon, kaj la proksiman dimanĉon mi promenis kun negroj en la suna marbordo de la Chesapeake-Bav. Aeroplano denove portis min norden kaj la sekvontan dimanĉon mi jam pasigis sur la oceano, por esti la postan dimanĉon kun Esperantistaj kaj koltaj amikoj en Dublino, la irlanda ĉefurbo. Kaj ses semajnojn antaŭe mi ankoraŭ estis en la « Prairie » okcidente de la Mississipi-rivero.....

Mi travivis belegajn horojn. En grandaj kunvenoj mi povis porti al multaj miloj da katolikaj gejunuloj la ideojn de nia Mondjunularo Katolika, kaj en multaj privataj interparoladoj aŭ malgrandaj rondoj mi povis diskuti kun geamikoj pri gravaj problemoj.

Al ĉiuj geamikoj, kiuj helpis min dum la vojaĝo, tutkoran dankon! Kaj ĝis revido!

Kiam mi revenis al Eŭropo kaj al mia hejmlando, mi trovis multajn aferojn ŝanĝitaj. Kaj jam baldaŭ mi devis komenci novan vojaĝon eksterlanden, vojaĝon neantaŭviditan, pri kiu mi skribos alian fojon.

En London iu demandis min antaŭ kelkaj semajnoj: « Kompreneble vi do tuj ĉesigis la publikigadon de La Juna Batalanto, ĉu ne? » Mi tuj respondis: « Kompreneble ni tion ne faras! Ju pli malfacila kaj danĝera la situacio fariĝas en iu lando, des pli nia laboro kaj nia gazeto estas necesa. » Ni ne lasas nin venki per iaj politikaj danĝeroj. Kaj ni atendas de ĉiuj niaj kumbatalantoj kaj de ĉiuj gelegantoj de La Juna Batalanto, ke ili helpas nin kaj restos fidelaj, ke ili eĉ varbos novajn abonantojn kaj novajn membrojn.

Ĉi tiun numeron de nia kara gazeto mi redaktas malproksime de mia hejmo kaj de mia kutima redakcia tablo. Mi troviĝas en Paris, nur kelkajn paŝojn malproksime de la tombo de Sankta Genoveva, kiu sen armiloj savis la urbon Paris el la atako de la hunoj. Si preĝu por ni, kiuj volas batali kontraŭ la internacia malamo kaj la minacanta milito, kiu neniuĝis la civilizitan mondon, se ne en la lasta minuto la nacioj vekigis. Sankta Genoveva elpetu la Dian benon por ni, kiuj ne volas toleri, ke denove milionoj da homoj, kiuj nomiĝas kristanoj kaj katolikoj, ĵetu grenadojn kaj venengasojn kontraŭ siaj fratoj!

Wilhelm SOLZBACHER.

Granda porpaca manifestacio en Wien.

Ĉefepiskopo Kardinalo D-ro Theodor Innitzer pri

« La paco kaj la Sankta Jaro ».

Sekvinde inviton de la Aŭstra Ligo por Ligo de Nacioj, la Viena ĉefepiskopo parolis la 21 februaro en la de pli ol 2000 personoj plene okupita granda salonego de la koncertdomo — pluaj 1000 personoj devis ree foriri, ne plu ricevinte enirbiletojn — pri la menciita temo. La esenca enhavo de la tre signifa parolado estas jena:

Dankante pro la invito, la ĉefepiskopo akcentis, ke li ĝin sekvis des pli volonte, ĉar nia jaro estos festata kiel Sankta Jaro okaze de « la 1900-a mortotago de la plej granda pacbatalanto ». Ĝi instigu la kristanojn de la tuta mondo al pli intensa agado por paco kaj unueco de la popoloj.

La Eklezio ne volas beni la armilojn, sed la pacopalmojn. — La Eklezio estas kontraŭ la milito. Ĝi ne povas alie, sen veni en kontraŭecon al la instruo de Kristo. La sinteno de la Eklezio al paco kaj milito estas klare signita per la Sankta Skribo, la ekzemplo de Kristo, kaj la instruoj de la apostoloj. Jam la profetoj de la malnova testamento havis pacifistan esperon je la Mesio, plej forte Jesaja, vidante la mesion kiel pacoprincon, transformantan la glavojn al plugiloj. Kristo mem, precipe en sia parolado sur la monto, ĉiam denove predikis la pacon: « Se iu vin frapas sur la dekstran vangon, prezentu al li ankaŭ la maldekstran »! Ni, laŭ kardinalo Faulhaber, ne klopodu per laŭvorta konsidero senigi tiujn eldiraĵojn de ilia profunda senco. — « Havante malpacon kun via frato, unue repaciĝu kaj poste venu kaj dediĉu vian oferaĵon » — « Petro, metu vian glavon en la ingon! ». En la laŭŝajne kontraŭa esprimo: « Mi ne estas veninta por alporti la pacon, sed la glavon » oni sub glavo ne devas kompreni la armilon, sed la atakojn kaj persekutojn faratajn kontraŭ la kristanoj.

La apostoloj daŭrigis la pacpredikadon de Kristo. Tute decidaj pacbatalantoj estis la ekleziaj patroj, antaŭ ĉio la rifuzintoj de militservo Tertullianus, Origenes, Lactantius. Ankaŭ Cyprianus kaj Ambrosius kondamnis la militon kiel krimon

kaj murdon. « **Ne decas al kristanoj, maljustaĵon rekompenci per maljustaĵo** ». Signifa pacinstruanto estis Aŭgustinus. Tre akre kontraŭ la milito sin esprimis la koncilio de Toledo.

Decido de ĝi estis: Pastroj partoprenantaj en milito perdas sian eklezian rangon kaj dignon kaj estos vive enkarcerigataj en monaĥejo. »

Kompreneble ofte montriĝis la malharmonio inter la kruda realeco kaj la idealo, sed la Eklezio neniam preterlasis, anonci, proklami kaj klopodi efektiviĝi tiun idealon.

Menciante la **krucmilitojn**, la ofte per entuziasma aplaŭdo interrompita parolanto konstatis, ke ili estis pelataj de alta ideo, sed ke la maniero de ilia efektivigo **ne estis laŭkristana**. Ili sekve de tio **ne estas aprobindaj**. Kun ili ankaŭ, videble, ne estis la beno de Dio. Same kondamnindaj estas la kristanigaj militoj de la frankaj imperiestroj (Karlo la Granda...).

Pritraktante poste nian epokon, la ĉefepiskopo atentigis precipe pri la pacagado de la lastaj papoj: Leono XIII-a, jam postulanta konferencon por malarmado, Pio X-a, kiu laŭaserte mortis pro aflikto pri la mondmilito, kaj tute speciale Benedikto XV-a, la granda papo de paco, postulanta Ligon de nacioj, malarmadon, devigan arbitracian juĝejon, liberecon de la maroj, kaj la nun reganta Sankta Patro Pio XI-a kaj ties encikliko por « **La paco de Kristo en la regno de Kristo** ». Li ankaŭ parolis pri la fama pacprediko de Kardinalo Faulhaber, el ĝi citante: La malnova sentenco « **Dezirante la pacon, preparu la militon** » devas esti ŝanĝata en « **Dezirante la pacon, preparu la pacon!** ». En tiu rilato li kun vigla bedaŭro demandis, kial oni ĝis nun **ne invitis la papon al aktiva kunlaboro** je la Ligo de Nacioj kaj instigis tion por estonte.

Ne povas ekzisti paco sen Dio, sen religio, sen justeco kaj amo, sed ankaŭ ne sen vera libereco. Tamen, kvankam la ĝenerala mondpaco verŝajne estos donaco nur de la lastaj tempoj, ni laboru senlace, seninterrompe por la paco!

En tiu senco Lia Ĉefepiskopa Moŝto finis per la profundsenta verso de Goethe « **Dolĉa paco venu...!** »

Post lia longe aplaŭdita grava parolado, **prelato D-ro Drexel**, mem travivinta la militon kiel armeestro kaj militkaptito kelkjara en Siberio pritraktis detale la temon « **Ĉu milito aŭ paco?** », speciale akcentante la profiteman rolon de la milit-industrio, la teruron de la moderna venengasmilito malaperiganta la heroecajn trajtojn de la milito, kaj pledante, malgraŭ ĉiuj malperfektaĵoj kaj malfacilaĵoj, por la Ligo de Nacioj, al kiu laŭ la propono de ĉefepiskopo D-ro Innitzer, la papo kiel granda morala aŭtoritato aliĝu!

Trad. (laŭ aŭskulto kaj gazetraportoj)

W. Mudrak, Wien.

KARDINALO INNITZER SKRIBIS AL MOKA:

La Ĉefepiskopo de Wien,

Z. 259

Vieno, la 25 januaro 1933.

S-ro D-ro Wilhelm Solzbacher, ĉefsekretario de Mondjunularo Katolika, Köln.

Tre estimata Sinjoro Doktoro!

Pro la karaj gratuloj je mia ĉefepiskopiĝo mi tutkore dankas vin. Same mi dankas pro la broŝuroj pri Esperanto senditaj al mi. Mi ĝojas, ke Esperanto tiom disvastiĝas kaj estas tiom subtenata de via unuigo.

Kun tutkoraj bensalutoj.

+ INNITZER.

La Franca Katolika junularo manifestas por la paco.

Kaj la germana junularo salutas ĝin.

Ni anoncis en La Juna Batalanto, ke la kongreso de la Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F., Lyon, 21-23 aprilo) havos kiel ĉefan temon la **pacon**. La kongreso estis grandioza sukceso, ne malgraŭ, sed ĝuste pro la serioza mondsituacio, dum kiu ĝi okazis. Tri kardinaloj (Verdier, Maurin kaj Binet) kaj granda nombro da episkopoj ĉeestis, 10.000 personoj venis al la ferma kunsido en la granda Foiŝalo. La forta volo de la junularo, labori por la paco kaj sekvi la papajn direktivojn, estis evidenta, kaj prave **Marc Schérer** diris en la finraporto:

« La Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F.) okupiĝas pri la paclaboro, kiel tion faris la papo mem. Se oni riproĉas al ni la seriozecon de la horo, ni respondos: Ĝuste en la tragikaj horoj oni devas konservi sian sangon malvarma. Ni ne donu al la paca afero simplan intelektan aliĝon; ni devas prepari homojn kun kristana konscienco, kiu permesas al ili, porti al la solvo de la internaciaj problemoj pozitivan kunlaboron, kiom ajn modesta ĝi estas, kies saĝeco kaj bona realista sento garantios efikecon. »

En la Granda Meso de dimanĉo, la 23 aprilo, **Mgr. Fillon**, episkopo de Langres, faris rimarkindan predikon pri la pacspirito kaj la kristana vivo:

« La paco ne estas nur foresto de milito, sed pozitiva rezulto de organizado de la internacia mondo. La pacspirito kondiĉigas precipe komprenon pri la realeco.

.....Estas nemalkoneble, ke nuntempe multaj ŝanĝoj en la internacia ordo aliĝis la problemon de la milito; la idealo de mondo, kie regus, dank' al daŭra solidareco inter la ŝtatoj, justeco, eble fariĝis malpli malproksima. Sendube tio estas evoluo; sed per inteligentaj evoluoj oni evitas la revoluciojn. Kiel nacia ordo estiĝis super la familioj, sen forpreni ion, kio rajte apartenas al la familioj, tiel ankaŭ internacia ordo povas estiĝi, respektante la patrolandojn kaj helpante ilin kaj ĉiun el ili, atingi siajn celojn. La organizado de la paco do ne estas sentimentala afero; ĝi ripozas sur pozitivaj, realistaj konceptoj. Sed kiel la paco, simile al ĉio bona, nur estas atingata per la klopodado de la voloj, nur la homoj, kiuj posedas spiritan doktrinon, povas, vere klerigite pri la faktoj, tiri el ili fruktodonajn konkludojn por la renovigo de la socio kaj de la intelektula mondo.»

Kun grandega aplaŭdo la kongreso akceptis la saluton, kiun alportis **Pastro Clemens**, ĉefsekretario de la Katolika Junvira Asocio de Germanujo:

« La paco estu kun vi! Tio estas la saluto sendita de 400,000 junaj germanaj katolikoj al siaj katolikaj fratoj en Francujo, kiujn mi salutas kun emocio. Ĉi tio ne estas politika manifestaĵo, ke mi diras al vi: la katolika germana junularo preĝas kaj laboras kaj batalas kiel vi, ke realiĝu internacia paco bazita sur la paco de Kristo. Ni estas ja infanoj de unu sama Eklezio. Se la sportuloj vojaĝas de ĉefurbo al ĉefurbo, se la kapitanoj de la industrio kaj la financistoj unuiĝas trans la limojn, se la fabrikistoj de militmaterialo havas de unu lando al alia la plej dangeŝajn rilatojn, se la malamikoj de la Regno de Dio ignoras la limojn de la patrolandoj, ĉu do la katolikoj diverslandaj devas resti en malvarma retenigo la unuj al la aliaj? Ĉu la amo estas malpli forta ol la malamo aŭ la profitemo? Ni devas doni la manon unuj al la aliaj kaj ami unu la alian. Tio estas la eminenta apostolado, kiun havas nova generacio en nova tempo. Nuntempe ne estas eble, ami sian patrolandon, se oni ne respektas kaj komprenas ankaŭ la najbarajn patrolandojn. Viaj laboroj, miaj fratoj en Francujo, atingis intelektan nivelon neatingitan ĝis nun en junulara kongreso en iu lando. Mi trovis en viaj okuloj la flamon, kiun mi serĉis. »

Dio benu la pacovolon kaj paclaboron en la katolika junularo de Francujo kaj Germanujo! La mondo ĝin bezonas.

J. B.

Militarismo kaj Pacifismo - - Kaj la Katolika Junularo de Germanujo.

La potenca katolika junulara movado, kiu iam estis admirata kaj enviata en la tuta mondo pro ĝia viveco kaj ĝiaj praktikaj realigoj, kiu ludis gravan rolon en la kultura kaj politika vivo de sia lando, kies batalo por la paco kaj por la renovigo de la socia kaj internacia vivo gajnis al ĝi honoran lokon en la katolika movado - - kiel ĝi nun fartas? Kial nun grandaj asocioj tiom emfaze parolas por tiu mistera afero, kiun oni nomas « Wehrhaftigkeit » (« defendo-volo ») kaj kiun ni malpli bele, sed pli klare tradukas per - - militarismo? Kaj la aliaj - - kial ili silentas?

La silenton oni povas simple klarigi. La registaro silentigas perforte ĉiun, kiu kuraĝas paroli. Ĉu ne pro publikigo de alvoko de katolikaj asocioj, inter kiuj la junularasocioj estis la plej gravaj, la tuta katolika junularo en Germanujo estis malpermesita por kelkaj tagoj? Ĉu ne « Die Junge Front », semajna organo de la junaj katolikoj, kaj « Der Jugendpraeses », gazeto de la pastroj en la Katolika Junvira Asocio, estis malpermesata? Ĉu ne August Günther, redaktoro de la germanlingva MOKA-gazeto « Erwachende Jugend », troviĝas en malliberejo?

Nin ĉi tie ne interesas la ĝenerala politika situacio - - nin interesas la sinteno de la katolika junularo. Kaj seniluzie rigardante ĝin, ni konstatas, ke ni perdis batalon. Se nova milito prepariĝas, la katolika junularo en Germanujo estos nek sufiĉe klarvida, nek sufiĉe forta por eviti ĝin. Se deviga militservo venos, ĝi ne efike rezistos ĝin, se la internaciaj rilatoj ĉiam plimalboniĝos en maro de malamo kaj kalumnioj, ĝi estos senhelpa, - - nova mondkatastrofo trovos ĝin nepreparita kiel 1914.....

Ni volas nenium ataki. Ni ne volas diskuti la demandon, ĉu alia sinteno sub la donitaj cirkonstancoj estus ebla. Ni scias, ke ĝis nun neniam granda katolika junulara asocio en lando kun deviga militservo efike kontraŭbatalis tiun institucion. Ni komprenas, ke estas tragika situacio, se oni devas elekti inter perforta dissolvo de asocio kaj kompromisoj al la reganta politika grupo. Ni povas diveni la forton de la premo, se ni aŭdas, ke la ligo de katolikaj juninstruistoj decidis oficialan aliĝon al la naci-socialista instruista asocio. Ni nenium kondamnas. Ni nur konstatas la situacion, por havi seniluzian bazon por la paca agado en la junularo.

Por kio? Ĉu ni do volas daŭrigi la agadon, eĉ en Germanujo? Kompreneble jes! Kaj ĝuste nun ni estas bezonataj! Estas tre facile, esti pacifisto en tempo, kiam multaj parolas pri paco kaj interpacigo. Sed alte teni la standardon en epoko de naciismo kaj militarismo, tio estas afero inda de oferoj kaj laboroj.

Kompreneble ni devas esti prudentaj. Ni devas eviti ĉian agadon, kiu ŝajnas havi rekte politikan karakteron. Ni devas evoluigi pli ol iam la **antaŭlaboron** por vera interkomprenigo, do la internacian korespondadon, la Esperanto-laboron, la informadon pri la katolika junularo en ĉiuj landoj. Ni devas esti pli ol iam singardemaj rilate al tio, kion ni legas en la ĵurnaloj.

Ni devas resti en kontakto kun ĉiuj asocioj de la katolika junularo, precipe kun tiuj ligoj, kiuj plej multe gardis internan sendependecon. Kaj ni devas ĉiam denove disponigi al ili niajn servojn.

Nia laboro devas esti, malgraŭ ĉio, pozitiva. Ni ne estas kontraŭ io, ni estas por la paco. Kaj ni devas gajni por ĝi tiujn, kiuj nun iras dangeŝajn vojojn...

B. M.

LEGU KAJ RELEGU la artikoleon de nia redaktoro sur paĝo 12! Kaj agu!

La Ĉefsekretario de Moka inter la Mohawk-Indianoj

Mi estis tiom aŭdinta pri la Mohawk-vilaĝoj apud la St. Lawrence-rivero en Usono kaj Kanado, pri la malnovaj kutimoj kaj tradicioj de ilia preskaŭ tute katolika loĝantaro, pri ilia privilegio, kanti en meso kaj vesperdiservo la liturgiajn kantojn en irokeza anstataŭ latina lingvo, ke mi el Chicago skribis al la misiisto Pastro Bourget. Kiam mi unu semajnon poste alvenis en New-York, mi trovis afablan inviton.

Glacio kaj neĝo, montegoj kaj lagoj, arbaro kaj erikejo. Nia aŭtobuso ne plu povis moviĝi en la alta neĝo; dum tri horoj ni faris vanajn klopodojn, ĝis kiam neĝplugilo alvenis, por fari la vojon libera. Fine mi eniris la lastan vagonaron. Ni estis nur du gevojaĝantoj: junulino, kiu iris ien en Kanado, kaj mi. En la soleca stacidomo de Nyando mi sukcesis trovi indianon, kiu venis, por transporti la poŝtaĵojn. Li konsentis veturigi min en sia aŭtomobilaĉo al Hogsburg, vilaĝo je la limo de la indiana teritorio kaj kie unu kamparano havas, ĉambrojn kaj manĝojn por fremduloj kaj nomas sian domon «Riverside Hotel». La familio estis katolika, kaj mi ĝojis trovi en la filo kaj la filino bonajn informantojn kaj helpantojn.

En la St. Regis - rezervacio vivas ĉ. 3.200 indianoj, el ili 1.500 sur usona kaj 1.700 sur kanada teritorio. Al la teritorio apartenas ankaŭ kelkaj insuloj en la St. Lawrence-rivero, kaj la plej riĉaj indianoj laŭdire vivas en la Cornwall-Insulo. Alia Mohawk-teritorio troviĝas pli oriente en Kanado, proksime al Montreal, ĝi nomiĝas Caughnawaga.

La « ĉefurbo » estas la vilaĝo St. Regis, kiun la usona-kanada limo tranĉas en du partojn. La preĝejo estas sur kanada tero. Ĝi estas tre malnova, « multajn centojn da jaroj », diris al mi la vilaĝanoj. Kiel mi poste eksciis, la ŝtonkonstruaĵo estiĝis en la jaro 1791, sed jam de 1746 la vilaĝo estas katolika kaj en tiu jaro oni konstruis lignan kapelon je la sama loko, kie nun staras la ŝtona preĝejo.

Jim konsentis akompani min en mia unua ekspedicio en la indianan teritorion. Ni marŝis ĉiam laŭlonge de la St. Regis-rivero. Kie ĝi enfluas en la St. Lawrence-riveron, estas monteto, sur kiu staras la preĝejo kiel forta kastelo. Kaj ĉirkaŭ ĝi estas la vilaĝo. La dometoj estas lignaj, kiel cetero la plimulto de la domoj en Ameriko, kaj diferencigas de la domoj de la blankuloj preskaŭ nur per sia malriĉa primitiveco. En la malnova tempo la irokezaj gentoj (al kiuj apartenas la Mohawk-nacio) havis domojn el betula ŝelo, sed nun nur plu ekzistas tre malmultaj da ili en St. Regis.

La plej multaj el la indianoj ne estas tute purrasaj. Ili interedziĝis dum longa tempo kun blankuloj, precipe franckanadanoj. Sed tre konservativaj ili estas pri sia lingvo. Kvankam ili lernas anglan lingvon en la lernejoj, nur malmultaj parolas ĝin bone, kaj multaj eĉ tute ne parolas ĝin. Ilia alfabeto havas nur 13 literojn, sed la lingvo estas malfacile lernebla. Krom Pastro Bourget kaj la misiisto en Caughnawaga (eble ankaŭ la episkopo de Ottawa, kiu iam estis misiisto inter ĉi tiuj indianoj) neniu blankulo parolas ĝin bone. Pastro Bourget montris al mi la solan ekzempleron de gramatiko kaj vortaro, kiu ekzistas. Ĝi estas manskribita kaj verkita franclingve. Presita gramatiko aŭ vortaro ne ekzistas.

Pastro Bourget akceptis min ĝentile. Li estas vera patro de sia paroĥanaro, inter kiu li vivas jam de 40 jaroj. En la unua tempo de lia aktiveco en St. Regis lia fratino edziniĝis kun indiano. La multaj infanoj el tiu edzeco ankaŭ denove geedziĝis, tiel ke la misiisto nun estas en parencaj rilatoj kun multaj el siaj geparoĥanoj.

Mia interparolado kun la misiisto apenaŭ estis komenciĝinta, kiam du virinoj alvenis, por preparoli familian aferon kun la pastro. Li petis min, resti kun li dum tiu konversacio, tiel ke mi povis bone observi la irokezan lingvon en praktika uzo.

Ni eniris la preĝejon. Ĝi estas bela ŝtonkonstruaĵo; ke oni estas en indiana preĝejo, oni nur vidas per la irokesaj surskriboj sur la bildoj de la krucoj. Elektra lumo aŭ gaso ne ekzistas en St. Regis, do oni lumigas per petrolo. Tra la meza koridoro iras la tuboj de la forno, ĉar la vintro estas malvarmega.

Pli kaj pli mi kutimiĝas al la karakterizaj vizaĝtraĵoj de la indianoj. Iliaj ordinaraĵoj estas neniel rimarkindaj, nur la tipa grandega kaptuko de la maljunaj virinoj estas escepto. En festoj oni ja ankoraŭ surhavas la malnovajn indianajn kostumojn kun riĉa plumornamo.

Ni eniras dometon, kie, kiel Jim diras al mi, troviĝas speciale bela indiana kostumo. Ni trovas du maljunajn virinojn kaj dekjaran knabinon. Unu virino parolas iomete angle, la alia tute ne, kaj la infano estas tro timema. La domo havas nur unu ĉambron en la teretaĝo kaj duan supre, al kiu iras kruta ŝtupetaro. La kostumon ni bedaŭrinde ne povas vidi, ĉar filino de la virino, kiu edziniĝis kun indiano el la Oneida-gento, prenis ĝin kun si. Sed la virino proponas, montri al ni siajn aliajn trezorojn. Goje ni akceptas. La virino parolas kelkajn vortojn en la Mohawk-lingvo al la knabino, la malgranda Agnes prenas la petrolampon, kaj ni grimpas supren. Antaŭe Agnes, poste la virino, kaj fine Jim kaj mi. Ni venas en la dormoĉambron. Je la unua vido ni rimarkas nenion eksterordinaran. Je la muro estas bildoj de la Sankta Koro de Jesuo kaj de la Plej Sankta Virgulino. Ili estas sufiĉe malbelaj, certe ili estis tre malmultekostaj. Krome ni vidas fotografajojn de famlianoj en malnovmodaj kadroj. Fine la kovriloj sur la litoj altiras nian atenton. Ili estas kunkudritaj el diverskoloraj partoj kaj estas plej akurata indiana manlaboro. Nun la virino malfermas keston kaj eltiras ĉiujn specojn da multkoloraj korbetoj kaj aliaj plektaĵoj. Vere mirindaj ili estas, kaj la plej multaj estas faritaj kun la « dolĉherbo », kies flaron la indianoj tiom ŝatas kaj kiu neniam perdas sian odoron. Volonte mi aĉetis kelkajn korbetojn; kaj ĉiam, kiam mi flaras la dolĉherbon, la odoro rememorigas al mi mian viziton al la Mohawk-indianoj.

Dimanĉon matene mi iris al la meso. De ĉiuj direktoj primitivaj glitveturiloj tiritaj de ĉevaloj alportis la indianojn. Multaj venis de la insuloj, la tuta rivero ja estis kovrita de dika glacio. Estis tre malvarme, kaj la indianoj protektis sin per dikaj peltoj. La sonorilo sonoris tiel vigle kaj goje, ke oni devis pensi pri la legendo, kiun oni rakontas pri ĝi. La reĝo de Francujo sendis ĝin al la Mohawk-indianoj, kiam ili fariĝis katolikaj. Sed la sonorilo ne atingis sian celon. La angloj kaptis ĝin survoje kaj portis ĝin en preĝejoturon en Deerfield (Massachusetts). La Mohawk-gento aŭdis pri tio kaj faris militiron, por gajni la sonorilon. La sonorilon oni estis intertempe kaŝinta en morasto. Sed la indianoj trovis ĝin kaj triumfe portis ĝin al St. Regis. Multajn tiajn rakontojn oni aŭdas en la Mohawk-vilaĝoj.

La meso estis belega. Ĥoro de viroj kaj virinoj kantis la liturgiajn kantojn laŭ la melodio de la gregora ĥoralo, sed en irokeza (iroquois) lingvo. La Mohawk-indianoj ŝajnas esti la sola popolo latinrita, kiu ricevis tiun privilegion de la papo. La silentaj preĝoj de la pastro kaj la mallongaj responsorioj (Dominus vobiscum ktp.) estas latinaj. Mi ankaŭ aŭdis elokventan predikon preskaŭ unu-horan de Pastro Bourget, de kiu mi tamen nenion komprenis. Je la posttagmezo estis edifa spektaklo, vidi la preĝejon tiel plena kaj aŭdi la vesperpsalmojn kantitajn en irokeza lingvo; kaj poste sekvis la krucojo ankaŭ kantita kaj preĝita en tiu lingvo. La diservo daŭris matene du horojn, vespere 1 ½ horojn. La popolo do ŝajnas esti tre religiema.

Indiana familio invitis min, veturi kune en la ĉevaltiritita glitveturilo parton de la vojo. Kaj ni babiladis pri multaj aferoj.

Lunde mi vizitis katolikan lernejon (internejon) por 50 indianaj knabinoj 5-16-jaraj, kiun gvidas monahinoj. La institucio suferas treege pro manko de financa subteno, ser mi miris, kiel bonege la fratinoj ĉion aranĝis. Oni montris al mi la tutan domon, kaj mi vizitis la klasojn, por vidi, kiel la knabinoj lernas katekismen (en irokeza kaj angla lingvoj), kiel ili legas, skribas, kalkulas, kan-

tas, kuiras ktp. Fine oni kunvokis ĉiujn klasojn, por ke ili kantu kaj por ke mi parolu al ili. Mi serĉis miajn plej simplajn vortojn kaj rakontis al ili anglalingve pri infanoj kaj gejunuloj en aliaj landoj. Mi diris, ke la bona Dio kreis unu infanon kiel francan, alian kiel anglan, alian kiel hinon, alian kiel indianan, alian kiel negron, sed ke li amas ĉiujn per la sama amo kaj volas, ke ĉiuj vivu kune en konkordo nun sur la sama tero kaj poste en la sama ĉielo. Mi rakontis pri la MOKA-movado, kiu volas eduki junajn katolikojn de diversaj nacioj, rasoj kaj haŭtkoloroj, ke ili amu kaj helpu unu la alian kaj ke ili detruu inter la nacioj la fierecon kaj la malamon, kiuj venas el la infero. Mi diris, ke mi venis por alporti al ili la saluton de katolikaj gejunuloj ĉiulandaj kaj ke mi volas porti la salutojn de la Mohawk-knabinoj malproksimen trans la oceanon.

Iliaj okuloj brilis. Kaj ili kantis al mi siajn plej belajn Mohawk-kantojn.....

Wilhelm SOLZBACHER.

1100 JARA JUBILEO DE LA UNUA KRISTANA PREĜEJETO EN NITRA.

De Alojz Macek, Bratislava.

(Parolado disaŭdigita en radio de Bratislava- la 6 aprilo 1933.)

La slovakaj regionoj ĉiujn manifestas, manifestas ĉiuj unuoj naciaj kaj religiaj, manifestas ĉiuj slovakoj, ĉiuj slavoj kun ĉiuj siaj amikoj. Jes, ni manifestas, ĉar ni solenas la 1100-jaran datrevenon de la fondo de unua kristana sanktejo en Nitra, do tempon, en kiu la slovakaj gentoj kiel la unua el la ceteraj slavaj gentoj de okcidenta kaj orienta Eŭropo akceptis kristanan kulturon.

Kune kun la unua kristana preĝejo, kiu estis konstruita 833 en antikva Nitra, alvenis en nian regionon kristana kulturo. Nitra tiel ligiĝis al la koroj de la slovakoj, ke oni mencias la pasintajn tempojn, en kiuj ĝi floris, ankaŭ en nacia kanto « Nitra, kara Nitra... » En naciaj kantoj oni ofte priploras la pasintan gloron de Nitra.

La urbo Nitra kuŝas en la koro de Slovakujo, en fruktodona regiono apud plaŭdsone fluanta rivero Nitra; jam per sia loko ĝi estis taŭga centro, el kiu fontis nacia kaj religia kulturo de la komenco de ĝia alveno kaj vige fluis, vastiĝis kiel per vejnoj tra la korpo de Slovakujo.

La unuajn postsignojn de kristana kulturo la historio konstatas en Nitra jam en la kvara jarcento. Paulinus, biografisto de Sankta Ambrosius, episkopo de Milano, skribas pri la « Stato de la Panona Eklezio », t. e. pri la eklezio sur la teritorio de la hodiaŭa Slovakujo, kaj citas, ke la reĝino de la Markomanoj, tiamaj loĝantoj de Slovakujo, Frigidilda, ekscianta pri la virtoj de la episkopo Ambrosius, petis lin, ke li instruu ŝin en la kredo. Kaj Saladius konkludas, ke al Frigidilda estis senditaj du apostoloj el Milano, kiuj kiel unuaj alportis al la slovakaj teritorio la kristanan kulturon. Kaj en la jaro 824 skribas la papo Eŭĝeno II-a leteron al la ĉefepiskopo de Passau, en kiu li citas episkopon de Nitra Alewin.

El tio oni povas konkludi, ke la slavoj venantaj al la teritorio sub la Tatra-montaro, konis jam la kristanismon malgraŭ tio, ke la Markomanoj jam malaperis. Sed vere kaj definitive ŝetis ankron la kristanismo en la teritorio de la subtatra regiono per la fondo de unua kristana preĝejo en la jaro 833 en la kastelo Nitra, de kie la unua slovakaj princo Privina regis la plej grandan parton de la hodiaŭa Slovakujo.

(FINOTA.)

NOVA JARKOLEKTO de nia organo komenciĝas per ĉi tiu numero. Ĉu vi jam pagis la abonon?

Nia Movado

Internacia Oficejo.

La internacia sekretariejo de MOKA estos transigata al alia lando. La definitivajn informojn ni esperas doni en la venonta numero. La sekretario estas vojaĝanta eksterlande, korespondantoj bonvolu do havi paciencon. Korespondantoj sendataj al la ĝisnuna adreso ĉiam alvenos.

Eldonejo La Juna Batalanto.

Malgraŭ prudenta laborado la jaro 1932/33 de La Juna Batalanto finiĝis kun deficito, kiu ĉefe estiĝis per la bedaŭrinda fakto, ke sufiĉe granda nombro da abonantoj ankoraŭ ne pagis por la pasinta jaro, parte per la malfacilaĵoj de internacia monsendo el certaj landoj. Faru vian devon, pagu frutempe kaj varbu abonantojn!

Internacia korespondado.

Dum sia vojaĝo en Ameriko la internacia sekretario de MOKA ricevis de granda nombro de katolikaj junuloj kaj precipe junulinoj petojn pri korespondado. Kiu deziras korespondi kun ili, skribu tuj al MOKA, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, sciigante nomon kaj adreson, profesion kaj aĝon, lingvokonojn kaj specialajn dezirojn. Ankaŭ kun katolikaj negroj (studentoj kaj intelektuloj) korespondado povas esti perata. Inter la amerikanoj jenaj lingvokonoj estas proponataj: angla, franca, germana, hispana, slovaka, rusa. Kelkaj nun lernas Esperanton. Al demandoj aldonu respondokuponon aŭ poŝtmarkojn!

Aŭstrujo.

La Esperanto-kursoj por anoj de la ĉeĥa katolika gimnastika societo « Orel », gvid. Mudrak, kaj por katolikaj skoltaj, gvid. Jakob, bone progresas. La 11 februaro okazis Esperanto-Vespero aranĝita de S-ano J. Krenk, dum kiu Walter Mudrak koncize parolis pri « Esperanto kaj katolikismo ». Ĉestis dekanano parohestro Honigschmid.

Niaj Vienaj geamikoj ricevis viziton de kroata Esperantisto kaj kunlaboranto de MOKA.

Kardinalo D-ro Innitzer, ĉefepiskopo de Wien, akceptis la 13 januaro en aŭdienco la estraron de Katolika Unuiĝo Esperantista, inter kiu ankaŭ troviĝis nia MOKA-sekretario W. Mudrak. La ĉefepiskopo kun intereso aŭdis la raporton de la prezidanto S-ro Chiba, salutis la laborojn kaj aprobis la Esperanto-diservojn de KUE, li ankaŭ konsentis pri la prezentita plano de Esperantistaj kunvenoj en la granda Katolika Kongreso (septembro 1933) kaj promesis persone ĉeesti Esperanto-kunvenon.

KUE havis sian jarkunvenon la 19 marto. Pastro G. Plank donis la sanktan benon en antaŭa diservo. Pastro F. Kudrnovsky parolis enkonduke pri la graveco de la venonta Ĝenerala Kongreso de Germanaj Katolikoj, al kiu estas ankaŭ invititaj aliaj nacioj, kaj la granda tasko de la katolikaj Esperantistoj je tiu okazo. Prez. Chiba memorigis la mortintojn de la lasta jaro, precipe Kardinalon Piŝl. En la estrarelektaj rezultoj estis jenaj: Prezidanto Leop. Chiba, vicprezidantoj L. Siedl kaj W. Mudrak, sekretariinoj M. Mildschuh kaj S. Scherpon, kaj la aliaj estraranoj, i. a. novelektita N. Hovorka. S-ano Chiba kun granda aplaŭdo estis elektata honora membro. Sekvis deklamoj, kant- kaj muzikprezentadoj.

Katolikaj pabatalantoj! La Ĝenerala Katolika Kongreso en Wien (vidu specialan alvokon!), kiun partoprenos anoj de multaj nacioj, donos okazon de interrilato. Laŭeble specialaj aranĝoj estas en preparo. Okazas ankaŭ aparta kunveno de Krucligo (katolika abstineca movado).

La aŭstra episkoparo pri la alkoholdemando. La aŭstra episkopa konferenco faris gravajn decidojn nun oficiale publikigitajn en la ekleziaj eparkiaj gazetoj kaj ankaŭ en la tag-jurnaloj. La plej gravaj estas: Rekomendo de laŭplana kontraŭbatalo de la alkoholismo kaj de la drinkemo, rekomendo de tiucela totala abstinenco de multaj individuoj, kontraŭbatalo de la trinkkutimoj kaj de la trinkdevido, edukado de la junularo al abstinenco, starigo de sanigejoj por alkoholmalsanuloj, klerigo de la popolo pri la malbono kaj la malbonaj sekvoj de la alkoholismo. Graveco, pritrakti la kontraŭbatalon de la drinkemo en la animprizorgado kaj tiucele instrui la pastro-studentojn en la seminarioj pere de fakuloj pri la alkoholproblemo kaj la kontraŭbatalo de la drinkemo. Kuraĝigo al fondo de lokaj grupoj de la Krucligo, la aŭstra katolika abstinulorganizaĵo oficiale aprobita, aliĝo al la

Krucligo, pritraktado de la alkoholproblemo en la kunvenoj de katolikaj unuigoj. - - Tiuj decidoj estas grava kuraĝigo de la malfacila, sed necesega agado de la Krucligo!

Ĉeĥoslovakujo.

Bratislava. Nia amiko Alojz Macek faris radio-paroladon en Esperanto pri la festoj en Nitra okazontaj la 12-15 aŭgusto 1933. Ni represas la paroladon en ĉi tiu numero. Okazos ankaŭ Esperanto-diservo kaj Esperanto-kunveno. La urbo kuŝas survoje de la skolta jamborea loko en Hungarujo, do oni facile post la jamboreo povas iri al Nitra. - - Samideano Macek preparas fondon de Esperantista Fako de Slovakaj Katolikaj Skoltoj, ĉar ili jam estas sufiĉe multnombraj.

Francujo.

La nacia sekretario de MOKA eldonis la unuajn du numerojn de la nova franclingva MOKA-bulteno « Le Lien de la Jeunesse Catholique » (« La Ligilo de la Katolika Junularo »). Francaj abonantoj de J. B. ricevas ĝin senpage. Aliaj sendu respondkuponon por ricevi kelkajn ekzemplerojn. Adreso : P. J. A. Muffang, 14bis av. Galois, Bourg-la-Reine, Seine. La bulteno i. a. regule enhavos raporton pri la enhavo de J. B.

La internacia sekretario de MOKA restadis kelkajn semajnojn en Paris kaj havis interesajn interparoladojn kun la nacia sekretario kaj kun gvidantoj de la katolika junularo. La 8 majo li faris paroladon antaŭ katolikaj gestudentoj de la Sorbonne-Universitato.

Germanujo.

La redakcio ne povas multe raportoj. Evidente la politika revolucio faris ĉiun internacieman laboron pli malfacila kaj eĉ danĝera. August Günther, redaktoro de la germanlingva MOKA-gazeto « Erwachende Jugend », estas en malliberejo. Aliaj amikoj skribis kun misteraj aludoj (Germanujo ja havas letercenzuron), kiujn ni ofte ne komprenis, ke ili ne plu povas kunlabori kiel ĝis nun. Ni tamen esperas, ke la plejmulto de nia MOKA-anaro restos fidela kaj eĉ plifortigos la agadon.

« *Saluton* », la monata cirkulero internacia de niaj amikoj en Miltenberg, regule elvenis kaj estas tre interesa kaj rekomendinda. Skribu al : Pastro Kiessner, prefekto, Kilia-neum, Miltenberg a. M.

Lasthore ni ricevas longan leteron de la *nacia sekretario Heinz Kolvenbach*. Li paroladis pli ol 40-foje antaŭ ĉ. 1300 homoj pri la bolŝevismo. Antaŭ kelkaj semajnoj okazis grava paca kunveno en Düsseldorf, en kiu MOKA partoprenis per ekspozicio de literaturo kaj propagandiloj. En majo aperas cirkulero al ĉiuj kunlaborantoj. En la venonta tempo nepre niaj praktikaj institucioj kaj la pedagogia agado devas esti la ĉefa afero. Depost la 1 aprilo 1933 la semajna gazeto de la katolika junularo « Die Junge Front » fariĝis duonoficiala organo por la germanaj MOKA-anoj. Ĝi kostas nur 10 fenigojn po numero. Ĉar ĝi aperas en Düsseldorf, nia nacia sekretario povas facile intertrakti kun la redakcio. La *vojoŝervo* projektas por la pentekosta tempo dusemajnan biciklovojaĝon al Belgujo kaj Francujo, eble ankaŭ vojaĝon al Anglujo.

Düsseldorf. La nova serio de kursoj en nia Pestalozzi-Instituto komenciĝis la 1 majo. Okazos serio da paroladoj pri la bolŝevismo.

Ĥinujo.

Nacia sekretariejo de MOKA. Nia ĝisnuna MOKA-sekretario Pastro Andreo Chang O. F. M. transloĝis al Romo. La nova sekretario estas D. Paŭlo Ĉ'ang S. S., Catholic Mission, Pu-ŝien, Shan-si Ĥinujo. Ni deziras al lia agado plenan sukceson.

Irlando.

La internacia sekretario estis unu semajnon en Dublin (Baile Atha Cliath), kaj dank' al la fervora helpo de niaj amikoj Lorcan Oh Uiginn, H. Macauley, Frato Atanzio ktp. la vizito estis tre sukcesa. La ĵurnaloj preskaŭ ĉiutage enhavis raportojn kun favora atento pri MOKA, Esperanto, La Juna Batalanto ktp.. D-ro Solzbacher faris unu publikan paroladon por la katolika junularo en kunveno, kiun prezidis la pastra gvidanto de la Kaolika Skolta Asocio, alian paroladon antaŭ invitita rondo de gvidantaj katolikoj kaj trian en la Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj. Li vizitis ankaŭ la Prezidanton de la Registaro, S-ron Eamon De Valera, la urbestron de Dublin, la sekretariejojn de katolikaj organizaĵoj kaj la redakciojn de la ĵurnaloj. Li kredeble ankoraŭ en ĉi tiu jaro denove vizitos Irlandon, por fari serion da paroladoj en katolikaj rondoj. La irlanda popolo estas tiel katolika, ke ĝi vere devus ludi pli gravan rolon en la internacia katolika agado.

Kanado.

Montreal. La internacia sekretario de MOKA vizitis la gvidantojn de du gravaj franclingvaj katolikaj junularasocioj : Katolika Asocio de la Kanada Junularo (A. C. J. C.) kaj Katolika Laborista Junularo (J. O. C.). La pastra ĉefgvidanto de la J. O. C., Pastro Roy O. M. I., ja estis vizitinta lin unu jaron antaŭe en Köln. Espereble la kontakto kun la kanadaj asocioj estos fruktodona. Paroladoj ne okazis, ĉar la tempo por tio estis malfavora. Sed la MOKA-sekretario promesis novan viziton en alia jaro.

Litovujo.

Telšiai. Studenta Esperantista Grupeto en la katolika pastra seminario vigle laboras. Ni ricevis entuziasman leteron de ĝia gvidanto Kazlaŭskas, en kiu li diras i. a. : « Kresku, floru kaj disvastiĝu nia kara J. B. sur la terĝlobo! »

Peruo.

La nacia sekretario sciigis al ni jenajn ĝojigajn novaĵojn : La katolika ĵurnalo « Verdades » (Veraj) estas favora al Esperanto, ĝi publikigis intervjuon kun nia samideano kaj kunlaboranto Ildefonso Nunez. Nia samideano tradukis el Esperanto en hispanan lingvon la historion de Mondjunularo Katolika, ĝi aperis en « Verdades ». - - La ĵurnalo « El Comercio », ĉeforgano de Lima, publikigis raporton pri la vizito de nia sekretario Ildefonso Nunez en sia propagando. - - En la nova revuo « Letras » aperis noto pri nia sekretario, ĝi estas favora al Esperanto kaj publikigos novaĵojn pri la Esperanto-movado. - - La nacia sekretario petas siajn gekorespondantojn, sendi korespondantojn al *nova* adreso : Ildefonso Nunez, Box 2704, Lima, Peruo.

Portugalujo.

MOKA ĝojis trovi sian unuan portugalan kunlaboranton en Antonio Caldeira Firmino (Coimbra), kiu klopodas vekti intereson pri Esperanto en katolikaj rondoj.

Salvodoro.

En ĉi tiu respubliko de Centra Ameriko Carlos Alberto Siri, gvidanto de la katolika junularo kaj redaktoro de la semajna gazeto « Criterio », fariĝis kunlaboranto de MOKA.

Usono.

La internacia sekretario de MOKA vojaĝis du monatojn en Usono, farante grandan nombron da paroladoj en 12 ŝtatoj : New York (New York City, Albany, Buffalo, Niack, Saratoga, Hogansburg), Illinois (Chicago, Peoria, Aurora, Oak Park, Bloomington, River Forest, Western Springs, Evanston), Indiana (Hammond), Wisconsin (Milwaukee, Sheboygan), Ohio (Cleveland), Michigan (Detroit), Iowa (Iowa City), Missouri (St. Louis), New Jersey (Friendstown), Pennsylvania (Philadelphia, Johnstown, Altoona, Westtown, Pendle Hill, Haverford), Maryland (Ridge), District of Columbia (Washington). Li faris du radio-paroladojn, unu de Chicago kaj la alian de New York.

La plej gravaj katolikaj asocioj, kiujn D-ro Solzbacher povis viziti kaj kun kiuj MOKA starigis bonajn kontaktojn, estas : la Marianaj Kongregacioj kun la semajna ĵurnalo « Queens Work » en St. Louis; la Katolika Asocio por Internacia Paco en Washington; la Katolika Asocio por Akcelado de pli bonaj Rasrilatoj kun la revuo « Interracial Review » en St. Louis; la Katolika Konferenco de la Studentoj pri Religiaj Aktivecoj (Cis-cora) en Chicago, kies direktoro Pastro Reiner estas delonge bona amiko de MOKA; la Calvert-Klubo en Chicago; la Newman-Klubo en Iowa City; la Newman-Klubo en la Howard-Universitato por negroj en Washington.

En jenaj katolikaj kolegioj kaj universitatoj nia internacia sekretario paroladis, precipe pri internacia katolika junulara agado kaj MOKA : St. Xavier College (Chicago), Rosary College (River Forest), Mount Mary College (Milwaukee), Catholic High School (Johnstown), Indian Girls' School (Hogansburg), Trinity College (Washington), Cardinal Gibbons Institute (altlernejo por negroj, Ridge).

Centoj da ĵurnaloj kaj gazetoj parolis pri la vizito de nia ĉefsekretario kaj pri la MOKA-movado, kaj ni esperas, ke estonte bona kunlaboro de junaj amerikanoj en MOKA ebligos. Speciale ĝoja nia ĉefsekretario estas, ke li povis starigi kontakton kun grupoj kaj institucioj de katolikaj negroj en diversaj urboj. Pli detalaj raportoj pri spertoj kaj impresoj ankoraŭ aperos en J. B.

LA REDAKTORO DEZIRAS PAROLI AL VI...

Kara amiko, kara amikino, ĉu vi volas aŭskulti kaj pripensi unu momenton? Venu, sidigu! Mi vidas vin antaŭ mi, kvazaŭ mi premus vian manon kaj rigardus en vian okulon.

Granda estas la tasko, kiun ni volas realigi, granda estas la celo, kiun ni volas atingi. Depost pli ol 7 jaroj nia gazeto La Juna Batalanto estas la heroldo de nia agado. Kiom malgranda kaj malperfekta ĝi ankoraŭ estas, ĉu ne?

Lasu min paroli al vi pri la zorgoj de La Juna Batalanto! Ne ĉesu legi nun, pensante: Ho, oni jam trovos vojon por aranĝi ĉion! Ne konfidu tro al tiu Sinjoro « oni »!

La ekonomia krizo kaj la senlaboreco, la malpermeso de kelkaj registaroj, sendi monon eksterlanden, jam estis grandaj malhelpoj. Nun venis alia. Kiel vi eble scias, granda parto de nia abonantaro estas germanoj. La naciista revolucio en tiu lando timigis kelkajn amikojn, kiuj ne plu povas aŭ ne plu kuraĝas labori kiel ĝis nun.

Nia gazeto havis deficiton en la lasta jaro. Kaj nia laboro estas daŭre malhelpata per tio, ke tempo kaj laboro, kiuj estus necesaj por aliaj taskoj, perdiĝas en financaj zorgoj. Mi volas diri al vi malkaŝe la veran kaŭzon: Multaj gelegantoj ne vidas sian respondecon. Ili faras nenion, por varbi novajn abonantojn, ili eĉ ne havas sufiĉe da disciplino, por pagi frutempe sian abonon. Jes, neniam eksteraj malfacilaĵoj povas timigi nin, sed ĉi tiu malamiko en niaj propraj rangoj, ĉi tiu malzorgo kaj hontinda sendisciplineco estas maldolĉa kaj malĝojiga sperto.

Kion vi povas fari? Unue vi povas mem fariĝi fidela kaj regule paganta abonanto, ŝparante al ni multe da laboro, mono kaj zorgo. Vi povas varbi. Kial vi ne ĉiam denove vizitas viajn amikojn, varbante ilin por J. B.? Kial vi en grupo, kiu ĝis nun abonis nur unu ekzempleron, ne abonas du aŭ tri aŭ kvar? Aŭ kial vi ne decidus devigan abonon de ĉiu grupmembro? Kial vi ne iras en Esperanto-grupojn, en rondojn de la katolika junularo, varbante por nia gazeto? Kial ne? Kial ne!

Ĝis nun preskaŭ la tuta propaganda laboro estas farita de kelkaj geomikoj solaj. Se ĉiuj helpus, ni ne nur fariĝus sen zorgoj, sed povus entrepreni gravajn propagandagadojn nun neblajn!

Kaj se vi ankoraŭ havas iom da mono aŭ povas iel ricevi ĝin, donacu ion por la speciala kolekto, kiun ni hodiaŭ anoncas kaj malfermas!

Mi dankas vin pro via atento. Mi havas konfidon je vi. Ĉu mi en ĝi trompiĝos?
W. S.

Kolekto por Plifortigi La Junan Batalanton.

En la specialaj zorgoj de la nuna tempo ni bezonas specialan helpon. Ni do malfermas batalkolekton «por plifortigi La Junan Batalanton». Ĉiu, kiu iel povas, pensu, ke estas honora devo, plifortigi nian gazeton. Per ĉi tiu numero komenciĝas nova jaro. Tuj pagu vian abonon kaj aldonu ion por la kolekto! La rezultoj estos regule publikigataj en ĉi tiu loko!

ĈIU ESPERANTISTO devas havi la Fundamenton de Esperanto de D-ro Zamenhof. Ĝi kostas nur 1.20 RM, mendu ĝin de la Eldonejo La Juna Batalanto!

INTERNACIA JUNULARA AGADO.

Pri la internacia kunveno de la grupoj de politika katolika junularo okazinta en Bruxelles laŭ invito de la belga Centrale Politique de Jeunesse ni ankoraŭ estas informataj, ke en la urbdomo de Bruxelles la urbestro du Bus de Warnaffe akceptis la eksterlandajn delegitojn, kies plej gravaj estis D-ro Timmermans (Germanujo), D-ro Sevilla (Hispanujo), S-ro Hourdin (Francujo). En la laborkunsido oni aŭdis diverslandajn raportojn. Pri kelkaj punktoj ekzistas plena unuanimeco inter la junaj katolikaj generacioj de Eŭropo, eĉ se la konvinkoj devas adaptiĝi al malsamaj kondiĉoj de la nacia politiko. Ekonomio direktata per la koncernataj profesioj mem kaj ne per la ŝtato, anstataŭigo de la kapitalista malordo per nova ekonomia ordo, agado en la katolikaj partioj kun la celo de tiusenca transformo - tio ŝajnas esti komunaj tendencoj de la katolika junularo sur la politika kampo. Oni decidis fondon de daŭra internacia oficejo de la katolika politika junularo, kiu devas esti centro de dokumentado kaj informado kaj ligilo inter la diverslandaj movadoj kaj gvidantoj kaj devos eldoni periodan bultenon. - Ni aldonu, ke la ĉefa organizinto de la kongreso, Raymond de Becker, tuj post ĝi retiriĝis de siaj laboroj, por aliĝi al la kapucena ordeno. Al nia amiko Raymond niajn tutkorajn gratulojn kaj bondeziraĵojn!

Franca-germana kunveno de junulargvidantoj en Paris. La 22 kaj 23 aprilo okazis kunsido organizita de la Komitato de la Franca Junularo por la Franca-Germana Interproksimiĝo kaj de la germana Sohlberg-Rondo. El Germanujo ĉeestis 7 delegitoj, preskaŭ ĉiuj naciistoj aŭ naciistoj (la katolikaj asocioj ne estis reprezentitaj), el Francujo ĉeestis delegitoj de 11 junularasocioj, inter kiuj estis la Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F.), la Katolika Sulko (Sillon Catholique), la politikaj katolikaj grupoj de la Demokrata Popola Junularo (Jeunesse Démocrate-Populaire) kaj de La Juna Respubliko (Jeune République). Prezidis Jean Luchaire, direktoro de la gazeto « Notre temps » (Nia tempo). La celo de la kunveno estis, restarigi la kontakton inter la junularmovadoj en Francujo kaj Germanujo detruitajn aŭ malfortigitajn per la lasttempaj okazaĵoj, por ebligti kiel eble plej kompletan kaj sinceran klarigon de la opinioj. Oni grandparte sukcesis en tio kaj decidis daŭrigi la kontakton, por ke al la konstatitaj malsamaĵoj ne aldoniĝu malkomprenoj pro manko de ĝusta informado. De la politika vidpunkto estas grave, ke la hitleranaj germanaj delegitoj diris, ke la problemo de Elzaso-Lotaringo estas definitive solvita per la kontraktoj de Locarno. - La francaj delegitoj estis preskaŭ ĉiuj demokrattoj kaj pacifistoj (parte eĉ socialistoj), la germanaj estis hitleranoj kaj naciistoj. - Cetere la informo en la francaj ĵurnaloj, ke la delegitoj reprezentis preskaŭ la tutecon de la junularo de ambaŭ landoj, ne estas vera. La katolikaj junularaj asocioj en Germanujo havas 1 ½ milionon da membroj, neniu delegito de ili ĉeestis.

Internaciaj junularagadoj 1933: 24 julio-1 aŭgusto en Okcidenta Danujo (adreso por informoj kaj aliĝoj: Postbox 122, Kobenhavn, Danujo); 29 julio-19 aŭgusto en Anglujo (H. Faire, 20a, Beygrove Road, Colliers Wood, Merton, Surrey, S W 19, Anglujo); 6-10 aŭgusto en Chevreuse, Francujo (Franz Rona, Wien VII., Doblbergasse 2/26, Aŭstrujo); 8-14 aŭgusto apud Stavanger, Norvegujo (B. Nielsen, Bakkehus, Herlev, Danujo); 15-22 aŭgusto apud Brno, Ĉeĥoslovakujo (Heinz Bauer, Brno, Glacis 39).

La junularaj grupoj de la Internacio de Militkontraŭuloj organizas internacian konferencon en Paris, 3-5 aŭgusto 1933. Adreso por informoj kaj aliĝoj: Franz Rona, Wien VII., Doblbergasse 2/26.

Mondkongreso de la Junularo kontraŭ Milito kaj Faŝismo okazos en aŭgusto en Paris laŭ invito de Henri Barbusse, Romain Rolland, Prof. Langevin kaj de la rondo, kiuj partoprenis la Amsterdaman Kontraŭmilitan Kongreson; la komunistaj kaj bolŝevismemaj elementoj do ŝajnas esti la plej aktivaj tendencoj en la preparo.

La Socialista Junulara Internacio havos la 12 majon en Amsterdam kunsidon de sia Ekzekutiva Komitato. La internacia sekretario, kiu ĝis nun estis en Berlin, kredeble translokiĝos al Bruxelles.

Alvoko al ĝenerala kongreso de germanaj katolikoj

Generala Kongreso de germanaj katolikoj (Allgemeiner deutscher Katholikentag) kun internaciaj gastoj okazos en septembro 1933 en Wien. Oni tiuokaze festos 3 jubileojn :

1. La 500-an datrevenon de la finkonstruado de la fama gotika katedralo de Sankta Stefano, kies (138 m.) alta turo fariĝis la « ekkonilo » de la ĉefurbo apud la Danubo.

2. La 250-an datrevenon de la liberigo de Vieno kaj per tio la savo de la okcidento de la sieĝo de la turkoj (1683). Pro tio ankaŭ estas tute speciale invitataj tiuj (sed same ĉiuj aliaj) nacioj, kiuj tiam kunhelpis defendi la okcidentan kulturon kontraŭ la atako de la oriento.

3. La 80-an datrevenon de la unua kongreso de germanaj katolikoj en la sama urbo.

Sed ne unuavice por festi jubileojn en ĉi tiu tempo de premanta mizero kaj ĝenerala krizo, ĉefepiskopo Kardinalo D-ro. Th. Innitzer invitis la grandan kongreson al nia urbo sed antaŭ ĉio por kolekti ĉiujn katolikajn fortojn de la okcidento en preĝo kaj serioza laboro por trovi plej taŭgan, konforman vojon, por efikiĝi la kristanan ideon inter la homaro de nia epoko, tute laŭ la devizo : *Kristo la reĝo!* Denove kuniĝu la kristanaj popoloj al defendbatalo, ne perarmila kiel iam, sed al spirita, anima, des pli energia kaj oferema batalo kontraŭ la modernaj malamikoj! Denove ja minacas danĝerigo de la oriento, la bolŝevismo, Memekkono, konsciigo pri la taskoj farotaj estas la antaŭkondiĉo por sukcesa plenumado de tiu batalo, en kiu la ĉela armilo devas esti *la kristana amo*, la realigo de amo kaj justeco, precipe ankaŭ en la socia kampo kontraŭ la nuna mondo de malamo kaj perforto : *Kristo la reĝo!*

En la kadro de tiu kunveno okazos ankaŭ *aranĝo de la katolikaj Esperantistoj* : Diservo antaŭtagmeza kun Esp.-prediko kaj festkunveno posttagmeza, la 11 septembro. Detala programo sekvos. - Eventuale ankaŭ ebligos senĝena kunveno de la MOKA-junularo.

Estu menciite, ke la Esperanto-aranĝo staras sub la speciala protekto de Lia Kardinala Moŝto D-ro Innitzer, mem granda favoranto kaj subtenanto de la katolika Esperanto-afero, li eĉ promesis persone ĉeesti.

Karaj gesamideanoj, ĝemikoj, ĝefratoj ĉiulandaj! Volu do aliĝi al tiu granda katolika festo kaj laborkunvenego! Por kontentiga rastado kaj varma akcepto estas antaŭzorgata, *50-procenta rabato sur la aŭstraj fervojoj* estas konsentita. Loĝejojn peras la ofiĉataj loka kongresa komitato. Sufiĉas anonci sin ĉe S-ro *Leopold Chiba*, prez. de KUE, Wien, IV., Schaumbürgerg. 5.

Koncerne MOKA-aferojn faru kromajn menciojn. *La modesta kotizo estos senĝata en proksima tempo.*

Aliĝu kaj venu multnombre! La katolikaro, sed precipe la katolika Esperantistaro de Wien kore invitas kaj bonvenigas vin!

W. Mudrak, aŭstra sekr. de MOKA, Wien VIII., Strozsigasse 19.

Festoj Okaze de la 1100-Jara Datreveno de la Unua Kristana Preĝejo en Nitra.

La festoj, pri kiuj Alojz Macek parolas en sia artikolo, okazos 12-15 aŭgusto. Laŭ la provizora programo la 12 aŭgusto estas destinita por interkonatiga vespero kun teatraĵo, la 13 aŭgusto estas « tago de la junularo » kun kongresoj de junularaj asocioj kaj prezentadoj de skolt- kaj gimnaslikasocioj, la 14 aŭgusto estas « tago de katolikaj viroj kaj virinoj », kaj la 15 aŭgusto estas ĉefa festtago. La programo enhavos Esperanto-diservon kun prediko kaj Esperanto-kunvenon. La prezoj estas tre malaltaj, precipe por gaskoltoj. Por detaloj skribu al : Alojz Macek, « Skaut », Kapitulska, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo.

MEMBROJN bezonas MOKA. Fariĝu membro kaj varbu membrojn.